
# Kial Esperanto?



Malgraŭ la grandegaj financaj rimedoj, kiujn ĉiuj landoj de la mondo elspezas por la instruado kaj tradukado de lingvoj, la problemo de la internacia komunikado, eĉ konsiderante la novajn teknologiojn, **restas nesolvita .**

1) Nuntempe granda parto de la rotarianoj loĝas ekster la regionoj de la angla lingvo, oficiala idiomo de Rotary.2) En Rotary, la tendenco koncerne la komunikadon, estas daŭre pligrandigi la nombron de la uzataj lingvoj, sen elekti ununuran nacian lingvon, ĉar ni havas Rotariajn Klubojn en 168 landoj. La nuntempa uzo de multaj lingvoj en RI signifas **postkuri la problemon** kaj ne antaŭvidi definitivan solvon.

3) La respekto pri homaj rajtoj, inkluzive la rajto al la propraj lingvo kaj kulturo, **postulas, en la proksima estonteco, komunikadon neŭtralan je internacia nivelo**, sen kulturaj aŭ ekonomiaj hegemonioj, je la sama nivelo por ĉiuj popoloj kun malsama gepatra lingvo, por atingi kaj garantii solidarecon, justecon kaj internacian kunlaboron sen diskriminacioj.

4) Nuntempe, en Unuiĝintaj Nacioj, japano, brazilano, italo, finno aŭ etiopo devas formuli siajn pensojn en la lingvo de argentinano, de franco, de ĉino, de arabo, de brito aŭ de ruso. **Krom la evidenta diskriminacio,** perdo de informoj, malfacilaĵoj en la esprim-maniero, ekzistas la granda kosto de tiu sistemo, sen konsideri la altajn salajrojn de tradukistoj, nek la medi-damaĝojn, ĉar ĉio estas produktita sur papere, farita el celulozo, kiu devenas el arboj, kultivitaj en gigantaj monokulturoj **( Savu Planedon Tero).**

5) Esperanto, kiel la telefono, estas bonega komunikad-rimedo, **kiel dua lingvo apud la etnaj idiomoj**. Ĝi estas malpli kosta, ĉar nenion kostas, estas neŭtrala, facila, klara, bela, inteligenta, logika kaj vere funkcias. Ĝi ne havas "posedanton", nek ekonomian aŭ politikan potencon. Ĝi vivas en ĉiuj landoj de la mondo en la mensoj de idealistoj, kiuj **havas larĝvidon kaj anticipas la estontecon.**

La nura lingvo en la mondo kiu kreis popolon, ĉar kutime la popoloj kreas siajn dialektojn, siajn tribajn idiomojn, siajn naciajn lingvojn.

6) Ĉiuj civitanoj havas sian naciecon, sian lokan kulturon, sed samtempe ili estas mond-civitanoj, samnivele kun ĉiuj aliaj; ili ne devas **submetiĝi balbutante malbone alies lingvojn**, sed povus komunikiĝi per lingvo neŭtrala, kiun ĉiuj lernas rapide pro ĝia facileco, logiko kaj pro ĝia ideologio respektante la lingvajn homajn rajtojn ankaŭ de la malgrandaj popoloj, de la civitanoj de landoj lingve malfortaj.

7) Esperanto ne donas avantaĝojn nur al kelkaj, sed harmonias kun la fundamentaj kriterioj de la " **kvar etikaj principoj" de Rotary**, ĉar ĝi estas vera, justa , kreas pli bonan volon kaj sendube pli bonajn amikecojn, krom esti bonfara por ĉiuj.

8) La plej malnova Amikaro de Rotary Internacia estas tiu de la **Rotarianoj Amikoj De Esperanto (RADE)**, kiuj ek de multaj jaroj renkontiĝas dum la Mondaj Kongresoj de Rotary aŭ vizitas sin reciproke sen iu ajn problemo pri komunikado.

***Informoj*** *<bonaespero.brasil@gmail.com> (Ĝenerala sekretario de RADE Giuseppe Grattapaglia)*